

The
NORTH AMERICAN
ESPERANTO REVIEW



Greetings,
San Diegans

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Majo - Junio • 1956

12-3

The North American Esperanto Review

(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

Vol. 4, No. 3.

May-June, 1956.

The Review not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

CONTENTS (English)

Hi-Ho, Come To The Fair	Page 1
Bonvolu Skribi (Please write)	2
Practical Uses of Esperanto	9
An Invitation	9
The Movement <i>IS</i> Moving	9
Contest Winners	11
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto	Inside Back Cover
ENHAVO (Esperanta)	
Bonvolu Skribi (Korespondpetoj) Paĝo 3	
Novaj Libroj	4
Junio (Poemo)	5
Aktualaj Problemoj de Internacia Korespondado	6
Esperanto en Norda Ameriko	7
Ree al Madison	8
La Akademio Decidis	12
Por Rimistoj	14
Oficialaĵoj	16

North American Esperanto Review:
2116 N. 35 St., Seattle 3, Wash., U.S.A.



NI PETAS, KE ONI NE PLU UZU
MALNOVAJN ADRESOJN

Esperanto League for North America
President: John L. Lewine:
50 Overlook Terrace, New York 33, N.Y.
Vice President: James D. Sayers:
Route 2, Lillie, Louisiana.
Secretary: Conrad Fisher:
Route 1, Meadville, Pa.
Treasurer: Edw. W. Pharo, Jr.:
220 County Line Road, Somerton 16, Pa.

Esperanto-Klubo de Los Angeles:
1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29,
Washington (D.C.) Esperanto Club:
2829 Gainesville St., S.E., Wash. 20, D.C.
Esperanto Association of New Jersey:
448 So. Orange Ave., Newark 3, N.J.
Esperanto-Societo de San Diego:
P.O. Box 4367, San Diego 4, California.
Seattle Esperanto Society:
3231 West 62nd St., Seattle 7, Wash.

WRITE TO MR. FISHER FOR
OTHER ADDRESSES

No material in this magazine is chosen for easy reading by beginners. That is not necessary in Esperanto. YOU can read the Esperanto part of this magazine! Read the "rules of the game" on the inside of the back cover. Buy, beg, borrow or otherwise acquire a good Esperanto dictionary. (The *Review* recommends the Edinburgh, 85¢ at Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.) Then go ahead and read! But if you want to really learn and use the language, we advise some form of guided study. Any of the organizations listed above will gladly help you. *F.R. Carlson*, Editor.

The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 4

May-June, 1956

No. 3

Hi-Ho,

Come to the Fair -

SOME 500 copies of this issue of the *Review* will go to San Diego County Fair visitors. To all the merrymakers we extend our best wishes. We hope you have a barrel of fun.

We also hope that, after the fair, you will enjoy the continuing pleasures to be found in the study and use of the international language, Esperanto.

Your local Esperanto group will gladly assist you in this fascinating study, and in establishing foreign correspondence and making practical use of the language.


LEARN ESPERANTO!

USE ESPERANTO!

HAVE



Bonvolu Skribi (Please Write)

 THE TWO WORDS:
"Bonvolu Skribi"
are the "big idea" of Esperanto.

Study of the international language itself is a fascinating intellectual adventure because of the challenge and stimulation it offers to your capacity for logical reasoning, your imagination, and your knowledge of your own language.

But Esperanto, like any other language, is a tool — an instrument for formulating ideas and communicating them to some one else.

It's fun to learn the technique of using a new tool. But the real pleasure comes with creative use of it.

And so you will generally find in every Esperanto magazine a list of names and addresses under the heading "Dezirataj Korespondantoj" (Want to Correspond), or something similar. In this issue of the *Review*, you will find them listed under: "Bonvolu Skribi".

Most Esperantists start foreign correspondence before they have really learned much of the language. In fact, we who teach Esperanto generally expect students to start using the language as soon as they

understand the simple system of word building.

Thanks to the simplicity and regularity of Esperanto grammar, the beginner can (if he will take the time to work carefully) write a readable letter by simply looking up the word-parts in his Esperanto-English dictionary, looking up grammatical endings in his textbook (or in the *Review*) and putting them together. By the time he receives an answer to his letter or postcard, he will probably have learned enough Esperanto to read it even without the dictionary.

And thus two more persons have established the basis for an international friendship. The thousands of such friendships now functioning on the basis of the international language are a mighty force for a peaceful and happier world.

The Esperantists have been 'way ahead of Mr. Eisenhower in realizing that:

"There never will be enough diplomats and information officers at work in the world to get the job done without help from the rest of us."

(*President Eisenhower, May 31, 1956.*)

TEXTBOOKS, READERS, DICTIONARIES

WRITE FOR FREE BOOK LIST

For anything in or about Esperanto, your best bet is always

ESPERANTO LEAGUE BOOK SERVICE


Middleton, Wisconsin

(The *Review* recommends the *Edinburgh* Esperanto-English Dictionary, 85¢)

Bonvolu Skribi

F-ino Tomoko Nakamura, Ichban-machi,
Takaoka, Toyama-ken, Japan

S-ino Kimiko Kakuo, Moriyama-mach,
Takaoka, Toyama-ken, Japan



ANKAŬ DEZIRAS KORESPONDI :

JAPANUJO

Jun Okamoto, 38 Usuyamachi, Kitaku,
Osaka. 16-jaraĝa studento, per leteroj
kaj BK, kun gejunuloj.

Yoshiaki Omura, ĉe S-ro Ryoichi Kimura,
2-1060 Ikebukuro Toshima-Ku, Tokio.
Studas fizikon ĉe Waseda Universitato.
Kun iu, kiu studas aŭ studis medicinon
aŭ teknologion, aŭ havas grandan inter-
eson pri ili.

S-ro Kacutaio Suzuki, Kunicuguĉo-671,
Higaŝijodogaŭa-Ku, Osaka. 42-jara apo-
tekisto. Leteroj kaj BK., prefere kun
apotekistoj.

Tanaka Yosikatu, Kanagawa-ken, Saga-
mihara-si, Kamimizo 2795. 18-jara stud-
ento. Kun student(in)o, interŝanĝi BK,
gazetojn, ktp. Ŝatas korespondi, sporti,
radion, muzikon.

Esperanta Grupo (en lernejo), ToHo-
Gakuen, Kunitati-mati, Tokio. 12-18-
jaraj studentoj. Kun grupo en Usono.


Ika-Ŝika Daigaku Esperanto-Klubo,
Juŝima 3-1, Bunkyo-ku, Tokio. 20-25-
jaraj medicinaj kaj dentaj studentoj, kaj
flegistinaj studentinoj.

Suzuki Masaĝi, Inaho-ĉo Higaŝi 7-25, Otaru
Arkitekto 25-jara, nove kristaniĝinta.
Kun arkitekto aŭ kostumdesegnantino.
Serĉas arkitekton, kiu skribis al li antaŭ
1½ jaroj. Li forgesis la nomon.

U.S.S.R.

Moskva Esperanto-Organizaĵo,
Moskvo, box 1004, Esperanto, U.S.S.R.

Novaj Libroj



La Literaturoj de Ĉiuj Landoj Estas Viaj per Esperanto!

Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo, D-ro Ivo Lapenna. \$1.50.

El ĉiuj Esperantaj libroj, kiujn mi estas leginta, tri elstaras kiel la plej interesaj: Viktimoj, Fine Mi Komprenas La Radion, kaj Kредu Min, Sinjorino. (Vi povas vidi ke miaj ŝatoj pri legaĵoj estas diversaj.)

Nun mi devas aldoni kvaran — libron pri la internacia juro! Mi konsilas al ĉiuj, kiujn interesas internaciaj problemoj, ke ili legu ĉi tiun libron.

Malgraŭ mia ĉiam forta intereso pri tiaj problemoj, D-ro Lapenna sukcesis doni al mi klaran komprenon pri aferoj, kiujn mi antaŭe nur nebule komprenis.

Oni ne atendas ke libro pri la internacia juro estu vere interesa legaĵo por nefakulo. Sed mi opinias ke ĉi tiu libro, originale verkita en Esperanto, rangas kun la fama anglalingva verkaĵo "Microbe Hunters" kiel interesege popularigo de seka teknika temo.

Ilustrita Vortaro de Esperanto, de Francisco Azorin kaj multaj helpintoj. Unua volumo.

Mi ne ŝatas pridiskuti libron, kiun mi eĉ ne estas vidinta. Sed ŝajne necesas, ke mi avertu la legantojn pri "Ilustrita Vortaro de Esperanto", de F. Azorin kaj aliaj. Kompetentuloj preskaŭ ĉie kondamnas la verkon pro eraroj kaj absurdaĵoj. S-ano Chomette, unu el la kunlaborintoj, diras ke li ne vidis presprovaĵon antaŭ eldono, malaprobis multon en ĝi, kaj petas ke oni ne kulpigu lin pri la fina rezulto.

S-ro Azorin estas petinta ke la Akademio pristudu la libron kaj donu oficialan verdikton. Mi mem konsilas, ke oni ne uzu tiun libron. Sed oni ne forgesu, ke tiu ĉi verko postulis grandegajn penojn kaj elspezojn, responde al multjara sopiro de la Esperantistaro. Ni kondamnu la verkon, se necese, sed ne la sindonajn laborintojn.

JULIO BAGHY

Julio Baghy, "la malnovulo" de Esperanta poezio, nun deziras prezenti novan volumon el proksimume 70 poemoj, sub la titolo "Aŭtuna Foliaro". La samtitola enkonduka poemeto aperis en la aprila *Revuo*. Sed necesas mono por tion fari. J. Régulo-Pérez, Apartado 25, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj, kiu eldonas la *Stafeto* librojn, diras ke li tre verŝajne povus aperigi la libron frue en 1957, se oni pruntedonus al li \$200. Kiu povas kaj volas helpi? S-ano Baghy nun malsanas. Oni ne ĝenu lin pri la afero, sed skribu rekte al S-ro Régulo-Pérez, laŭ la supra adreso.

Junio

(El *The Vision of Sir Launfal* de James Russell Lowell)

Kiel kompari tagon junian?
Tiam, se iam, la tagoj perfektas;
La ĉielo almetas oreĵon sian
Kaj varme, karese, la teron inspektas;
Ĉu ni rigardas, ĉu ni aŭskultas,
Vivo murmuras kaj vivo multas;
Ĉiu terbulo eksentas movumon,
Kaj supren celante per blindaj laboroj,
Instinkte grimpante por trovi la lumon,
Atingas animon en herboj kaj floroj;
La vaston de vivo ni trovas laŭ volo,
Ĉu sur la monto, ĉu en la valo;
Primoloj surprizas, kaj la ranunkolo
Spegulas la sunon en sia pokalo,
Dum ĉiu estaĵ' de l' insekta popolo
Palacon posedas sur iu petalo;
Birdeto sidadas ĉe sia portiko
En la folioj, la kap' en l' aero,
Ke lin superŝutu la plena efiko
De l' varma inundo de sun' kaj somero;
Kaj sub la flugiloj de la kunulino
La ovoj kuŝadas, kaj en ŝia sino
Ŝi kantas silente, dum li laŭte trilas;
En l' orel de Natur', kiu kanto pli brilas?

Tradukis D.B.R.

Bonvolu Skribi

F-ino Reiko Satoo, Mijajiku Elementa Lernejo, Asahi-maĉi, Jamagata-ken. 25-jara fraŭlino, instruas infanojn de la unuajara klaso en provinca urbeto. Precipe deziras interŝanĝi bildojn pentritajn de infanoj.


Yoshiaki Adachi, Tenmori, Kozoĵi, Higashi Kasugaigun, Aichi-ken. 22-jara studento en Amo-Akademio. Interŝanĝi bildkartojn.

Oohaŝi Jasuĵi, Hikumanorĵoo Koogakubu Ŝizuokadaigaku, 400 Oiŭakeĉoo, Hamamacu-ŝi. 22-jara studento de la elektra fako. Pri Esp.-movado, politiko, literaturo, junula vivo, ktp, interŝanĝi BK.

S-ro J. Tanuma-Tosio, Takinogawa 4 no 25 Kita-ku, Tokio. 51-jara profesoro de angla kaj franca lingvoj, aŭtoro de: *La Originoj de l' Protestantismo*, eldonita de Internacia Katolika Informejo, Nederlando. Kun amatoroj de literaturo kaj fotografado.

Trovu amik(in)on inter tiuj ĉi japanaj gesamideanoj.

Aktualaj Problemoj de Internacia Korespondado

 STAS DUBINDE, ke iu Esperantisto ne iam pensis, “Tiu ĉi peto en tiu ĉi gazeto ŝajnas interesa . . . Mi skribu al li!” (Au “al ŝi”, se nia korespondemulo aĝas inter 15 kaj 25, kaj ankoraŭ ne seniluziiĝis pri la kontraŭa sekso.)

Sed nia samideano, tiel decidinte, aŭ tuj eksidas kaj komencas tordi la cerbon pri la unuaj vortoj de la letero, aŭ ĝustatempe memoras la nepre videndan televizioprogramon — (Britan filmon, direktitan de la avo de Alfred Hitchcock, supozeble). Tiukaze, li kompreneble promesas sin skribi tiun leteron tuj post la fino de la programo . . . kaj je la sekvanta jaro, tiu letero ankoraŭ restas en neestujo.

Tamen, tiu ĉi artikolo ne pritraktas la neskribivolemulojn; (Ĝi devus pritrakti akrela verkintojn de tro longaj vortoj! *Red.*) tie ĉi mi volas klarigi al la pli novaj samideanoj kelkajn el la problemoj, kiuj povas plagi onin pri la internacia korespondado, esperante ke la novuloj povos profiti de estintaj spertoj.

Kiam 9-jara, mi foje respondis korespondpeton. La unua por mi, kaj mi preskaŭ ŝvitis sangon polurante la plej taŭgajn frazojn kaj rekopiis la leteron kvinfoje per ne tro firma manskribo ĝis mi fine opiniis la leteron sufiĉe bona. Mi neniam ricevis respondon de tiu germana fraŭlino. (Mi seniluziiĝis tre frue, vi komprenas.) Post kelkaj jaroj mi eksciis kial ne: Panjo rimarkis la koverton en la leterujo ekster nia pordo kaj, pensante ke ĝi estas nur la rezulto de 9-jarknaba fantaziludo, forprenis ĝin kaj metis ĝin inter la paĝojn de la familia biblio, kie mi trovis ĝin kelkajn jarojn poste!

Malgraŭ tiu malfeliĉiga unua peno, mi kuraĝis verki ankoraŭ aliajn, al Britujo, Hispanujo, kaj Francujo. Mi ricevis res-

pondojn, kiuj inkluzivis demandojn pri la alsendebleco de ĉokolado, ktp. . . por dolĉigi la interkonatiĝon, supozeble. Sed jen la tiamaj problemoj: miaj amikoj en la lernejo, kiam mi fiere pridiris la interŝanĝon de pensoj kun eksterlandanoj, ja miris, sed tro ofte pri mia mensosanece. Kelkaj el ili kutimis demandi, “Kial vi volas skribi al tiuj *fremduloj*?” Mi tiam ne konis la taŭgajn argumentojn kontraŭ ŝovinismo, tial nur povis respondi per “Falu morta!”

Kaj aliaj demandis, “Ĉu ne estus pli facile nur korespondi kun tiuj, kiuj komprenas la anglan? Kial malŝparu la tempon por lerni tiun ĉi -kiel vi diras? Esspurano?” Nu, ordinare tiuj demandintoj ne volis resti en la sama loko sufiĉe longe por ke mi povu klarigi la ĝuojn de internacia korespondado per Esperanto. Kion fari, mi hoveis, kion fari? Fine, mi feliĉe trovis la trafilon. De miaj korespondantoj mi petis — kaj ricevis — fotografiaĵojn, inter ili tiujn de junaj fraŭlinoj, kelkaj belegaj. Mi poste nur montris tiujn fotografiaĵojn al la amikaro ĉirkaŭ mi ĉe la lernejo kaj, anstataŭ mokridojn, mi komencis aŭdi, “Kiom da tempo necesas por lerni tiun Esspurano?”

Dum deĵoro en la usona militmaristaro, la korespondado suferis multe pro la poŝta prokrasto kaj mia ofta translokiĝo. Sed en botelo da malbongustega biero mi trovis la metodon: peti ke ĉiuj korespondantoj sendu la leterojn al mia hejmo, de
(*Daŭriĝo sur Paĝo 13*)

ESPERANTO EN NORDA AMERIKO

Washington, D. C.

Pli ol 50 ĉeestis kunsidon, la 9an de majo, kiam la klubo prezentis S-inon Toemengoeng, el Indonezio. 35 ĉeestis en aprilo, kiam S-ano Henri Soudee prezentis lumbildparoladon pri Monaco. Novan klason instruas S-ano Reed Irvine.

Newark, N. J.

La Esperanto Association of New Jersey aranĝis starigon de 14 vesperlernejaj klasoj por la venonta aŭtuno.

Portland, Ore.

Ĉe ekspozicia kunveno de la Forumo de Genealogio de Portland, S-ino Cecelia Thomas disdonis flugfoliojn pri Esperanto al ĉirkaŭ 200 vizitantoj. La bulteno de la Genealogia Forumo ankaŭ prezentis artikoleon pri la uzindeco de Esperanto por genealogiaj laboroj.

Spokane, Wash.

La *Spokesman-Review* prezentis leterojn pri Esperanto de S-anoj H.E. Dillinger kaj Thomas Bradshaw. S-ano H.K. Ver Ploeg nun klopodas starigi grupon kaj aŭtunan klason en Spokane. S-ano Ver Ploeg kaj lia edzino, en la fino de majo, vizitis gesamideanojn en Hillsboro, Portland, Seattle kaj aliaj lokoj.

Tacoma, Wash.

S-ano D. B. Richardson esperas baldaŭ starigi grupon en Tacoma.

Seattle, Wash.

La Seattle-aj Esperantistoj piknikos, la 15an de julio, en Lincoln Parko.

Riverside, Cal.

75 gesamideanoj el ĉiuj partoj de Suda Kalifornio, kaj eĉ el Meksikio, ĉeestis piknikon en Riverside. Dum la pikniko oni planis du piknikojn, unu en Escondido en la fino de julio, la alian en aŭgusto, loko ne tute decidita.

Los Angeles, Cal.

S-ano Chomette nun gvidas klason de 15 gelernantoj.

La grupo nun havas kunvenejon, kie 100 povas kunsidi. Ni esperu, ke ankaŭ tiu ĉambro baldaŭ estos tro malgranda.

Vizitis la majan kunsidon Ges-anoj Roel Damen el Nederlando kaj S-ano K. Noda el Japanujo.

Santa Monica, Cal.

Gesamideanoj en Santa Monica fondis novan klubon. D-ro Charles R. Witt, Prezidanto; S-ro S. Dunham Wilson, Vicprez.; S-ino Starr Wilson, Sekretariino; S-ro Tom Goldman, Kasisto. S-ro Scherer prezentis lumbildparoladon pri siaj spertoj kun Esperanto dum mondvojaĝo.

20 gelernantoj sin anoncis por matena klaso gvidota de S-ro Elwyn Reed, komence la 27an de junio. S-ro Tom Goldman kondukos klason kun 20 komencantoj ekde la 20a de junio.

La *Los Angeles Times* aperigis leteron pri Esperanto de S-ino Starr Wilson.

San Diego, Cal.

Pli ol 30 gelernantoj en la klaso de S-ro Cormier ĉe George Marston junula altlernejo restas entuziasmaj kaj jam korespondas kun geknaboj en aliaj landoj.

Ĉiumonate okazas kunveneto por kune vespermanĝi ĉe malkara restoracio kaj konversacii Esperante.

BONVOLU SENDI

al la *Revuo* adresojn de lokaj grupoj kaj aktivuloj. Neesperantistoj deziras lokajn kontaktojn.

Viaj gesamideanoj ankaŭ ŝatas legi pri vi.

Bonvolu Skribi!

PORTU LA VERDAN STELON



REE AL MADISON

POR NIA KONGRESO EN 1956

La Estraro de ELNA anoncas ke la Kongreso de la Ligo por 1956 okazos en Madison, Wisconsin, je la 24a, 25a, kaj 26a de aŭgusto. La Kongresejo estos la University of Wisconsin YMCA.

Provizora programo: Interkonatiĝa kunveno vespere, la 23an; ‘kongresetoj’ de fakaj grupoj, ktp., antaŭtagmeze, la 24an; ŝipekskurso sur la bela lago posttagmeze, la 24an, publika kunsido vespere, la 24an; aferaj kunsidoj, 10 atm. kaj 2 ptm., la 25an; bankedo vespere, la 25an; fina kunsido posttagmeze, la 26an.

Loĝado: Luprezo ĉe la YMCA (du en ĉambro) \$2.00, (unu en ĉambro) \$2.50. Por virinoj kaj geedzoj, oni aranĝos loĝadon en hotelo transstrate de la YMCA.

La Kongresejo estas bela nova konstruaĵo, kun bonega granda vestiblo por la interkonatiĝa vespero kaj diversaj kunsidĉambroj. Ĝi situas proksime al la lago kaj al la Universitato.

La Loka Kongresa Komitato petas ke ĉiuj ĉeestontoj tuj sendu sciiĝon al la L.K.K.-estro, S-ano Glenn Turner, Rt. 1, Middleton, Wisconsin.

Tiel do ni revenos triumfe al la scenejo de la unua Kongreso de ELNA. Al la fondintoj de la Ligo ĝi portos plezurajn memorojn.

Practical Uses of Esperanto

Mrs. Datoe Toemenggoeng, an Indonesian grandmother, is using Esperanto for a round-the-world trip to promote export sales of the various handicraft products of the women of Indonesia.

Mrs. Toemenggoeng, knowing only her native tongue and Dutch, learned Esperanto in less than two months, then used the Yearbook of the Universal Esperanto Association to contact fellow-Esperantists in many European countries, where she presented fashion shows of batik prints, and exhibited many other types of native art objects.

The Esperanto Club of Washington, D.C., sponsored a display on May 9 in the Pan American Union Building, while Mrs. Toemenggoeng was in Washington for conferences with officials of our State and Commerce Departments.

Mrs. Toemenggoeng says, "If I had not studied Esperanto, I would not have come to the United States or to Europe. If I had to learn English, French, German, Italian and all the others I would not be able to travel before I die."

WHAT'S DOING?

Do you sometimes wonder just how much progress is being made by the Esperanto movement?

So do most Esperantists.

Most Esperantists are individualists, who feel no obligation to report their activities to anyone.

A complete picture is thus impossible. But the Review will from time to time report information gleaned from here and there of work being done and progress achieved. As these are (we hope) of interest to many non-Esperantists, they will often be printed in English.

YOU ARE CORDIALLY INVITED

to attend the Annual Congress of the Esperanto League for North America, in the new building of the University of Wisconsin YMCA, Madison, Wisc., August 24, 25 and 26. On the evening of the 23rd, there will be a pre-Congress "get acquainted" session; in the morning of the 24th, meetings of various groups; a boat ride on the lake in the afternoon, an open meeting in the evening, the 24th; business meetings at 10 a.m. and 2 p.m. and supper together in the evening, the 25th; final business meeting, afternoon of the 26th.

Please notify the Local Congress Committee Chairman if you intend to attend the Congress, and write to him for any further information. Address: Glenn Turner, Rt. 1, Middleton, Wis.

This will be a "homecoming" event, as Madison was the scene of our first Congress, in 1953. Come and listen to "Esperanto as she is spoke".

THE MOVEMENT IS MOVING!

La Glumark-Kolektanto reports that an Esperanto exhibit in Novi-Sad, Jugoslavia (85,000 population) resulted in 250 persons participating in a new Esperanto course.

Esperanto is taught in more than 140 schools in at least 22 countries.

Esperanto Revuo Internacia

The Commission for Cultural Relations Abroad, of the Government of Jugoslavia, has expressed the desire "that Esperanto shall become a helpful instrument of understanding among peoples in the cultural field" and invites the institutions for cultural interrelations in other nations to join in action on that basis. *Revuo Esperanto*

BONVOLU SKRIBI

S-ro Borivoj Mihajloviĉ, Dim. Tucovica 6, Panĉevo, Jugoslavio. Profesoro. Intereso: Radio, transistoraj poŝformataj riceviloj.

Tookiti Itabasi, Hosobata, Nagamori, Gifu Japanujo. 56-jara malgrandega ĉionvendisto. Prefere kun komercisto. Korespondi kaj interesanĝi malgrandaĵojn.

Z. Krivec, Zagreb, Urbaniĉeva 15/1, Jugoslavio. Vidvino. Prefere kun 50—58-jara usona vidvo, celo geedziĝo. Sendu foton.

NOTO

La *Revuo* presas senpage, foje mallongiginte, korespondpetojn el aliaj landoj. Ili aperas nur se konvenas al la redakcio. Se oni deziras nepran aperon, oni pagu la kutiman reklamprezon (\$1 ĝis 7 linioj).

Attitude Research Laboratory, 946 Goodfellow Blvd., anoncis al la *Revuo* deziron provizi stipendiojn al kelkaj, kiuj volas entrepreni seriozan studadon pri la problemo, kiel atingi mondpacon. Se iu deziras plu esplori la aferon, skribu anglalingve al la supra adreso.

Maloficiala Aldono al Plena Vortaro

altaro: amaso da altaj homoj
amfiteatro: fiteatro por amo
ampero: pero inter viro kaj virino pri amo
anatemo: temo de aŭ pri anoj de societo
aneksi: ĉesi esti ano
anodo: speciala poemo verkita de iu ano
ansero: parto de dispecigita anso
aperturo: turo kiu aperas
arbusto: busto kun multaj kapoj
aresti: esti en amaso
artiklo: samtempa tiklo de multaj homoj
asekuri: kuri kiel aso
avida: patra

(el *La Progreso*, Beograd)

PORTU LA VERDAN STELON

ALIAJ GAZETOJ BONVOLU KOPII

Karaj Sinjoroj:

Bonvolu aperi la jenan leteron en via gazeto.

Por la unua fojo en Usono, urbego disdonis Esperanto-prospektojn pri siaj allogaĵoj. La San Diego kongres-kaj turistoficejo dissendos kvincent informilojn al diversaj landoj, al Esperanto-grupoj kaj gravaj personoj en la Esperanto-movado. Se vi volas ricevi ĉi tiun prospekton, bonvolu skribi, Esperante, al la San Diego kongres-kaj turistoficejo, 924 2nd Avenue, San Diego, Kalifornio, Usono.

Ĉiuj personoj kaj grupoj kiuj ricevos la presajon bonvolu skribi gratulleterojn al la turistoficejo pri la informiloj por helpi la disvastigon de Esperanto en Usono. Se la kongres-kaj turistoficejo de San Diego ricevos multajn leterojn oni certe presigos multe pli da prospektoj.

Samideane via,
Francis E. Helmuth, Prezidanto,
Esperanto-Societo de San Diego.

**L E A R N
ESPERANTO**

VIA AŬTOMOBILO Reklamas Esperanton

kiam ĝi portas reklamstrion (bumper strip) ĉi tian. Fluoreska verda koloro "lumas" en la malumo. Mendu po 20c, 6 por \$1 aŭ 12 por \$2. Esperanto-Societo de San Diego, Box 4367, San Diego 4, Calif.

CONTEST WINNERS: Congratulations to Fabian Sexton, O.S.B., whose letter to the *Cottonwood (Idaho) Chronicle* won first prize, and to Mrs. Joey Przybilla, whose letter to the *Winona Daily News* was second. Here are the letters:

FIRST PRIZE WINNER

War! Caused by Misunderstanding
and Lack of Confidence!

Esperanto is a universal Auxiliary Language. The idea behind it is to learn it along with your mother-tongue. This will enable you to speak to every other citizen of any country in the world! Esperanto means hope! It is very easy to learn. Its whole grammar consists of 16 short rules that any 8th grader can learn in one hour's time. It is interesting, instructive, living.

It has been tried and proven itself; it has been given the "Green Light" by UNESCO, a world educational authority. The secretary of the Esperanto League for North America is Mr. Conrad Fisher, Meadville, Pa.

You fear Atomic War, a war that would be more destructive than all other wars of history! What would any loving parent or friend not do to avert such a catastrophe? Without a doubt, "where there is a will, there is a way". Billions in cash, as experience shows, cannot do it. The billions freely handed to the Soviets are already proving a boomerang. The one thing, in my humble opinion, and the least expensive, also the most effective single factor, to avert war would be to learn Esperanto. This would remove all misunderstanding and mistakes . . . the very causes of war! Esperanto would substitute for all languages! Think! For nearly a hundred languages of the UN.

I have contacted several groups of people above average intelligence, regarding this. One suggested, "Trust in God"; another, "Religion"; a third, "Junk all the instruments of war." Very good and

a manifestation of high intelligence! But all agreed the most effective means of averting war would be a way of understanding each other, thus removing mistakes, misunderstandings, and doubts which are causes of war. Esperanto would obviate the necessity of teaching and learning foreign languages. It would save millions of hard earned taxes . . . hundreds of millions of hours of teaching and studying. Esperanto would take the place of all enabling you, as above stated, to speak to any national as you do to mother and father, without an interpreter.

Hence, I heartily recommend Esperanto. Any question?

See Fabian Sexton, Cottonwood, Idaho.

SECOND PRIZE WINNER

To the Editor:

In your March 14th issue I noticed an article captioned "Guided Missiles May Hasten One World".

It is stated that, "The problem of creating 'one world' is now hurtling toward humanity on the wings of the approaching intercontinental guided missile."

With the problem of creating 'one world' comes the problem of a common language, which would enable the people of the world to better understand each other. Which language should it be? One can pick any national language, but the other nations will not agree. Each language group prefers its own language with the result being confusion and lack of understanding between various nations. This situation needs no longer continue since UNESCO has given the "green light" to

(Continued on Page 15)

La Akademio Decidis

Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto
(N-ro 22 – Marto 1956)

Deklaro de la Akademio pri Ilustrita Vortaro de Esperanto

LA AKADEMIO DE ESPERANTO, kontrolinte la vortaron aperintan en 1955 en Meksiko sub la titolo “Ilustrita Vortaro de Esperanto, Unua Volumo” kaj sub la nomo de Francisko Azorin;

Konstatinte ke la aŭtoro

1. arbitre enkondukis formojn novajn kaj senprecedencajn por anstataŭigi multajn radikojn de la Fundamento kaj de la Oficialaj Aldonoj;

2. donis al kelkaj fundamentaj radikoj novajn kaj konfuzajn, neniam aprobitajn signifojn;

3. distranĉis memstarajn fundamentajn aŭ oficialajn radikojn en radikerojn kaj afiksojn, kiujn li mem elforĝis aŭ provizis per ĝis nun ne konataj sencoj;

Deklaras, ke tiu vortaro atencas al la netuŝebla Fundamento de la lingvo kaj al la tradicio registrita en la Oficialaj Aldonoj, sekve ke ĝi ne prezentas la veran staton de Esperanto;

Avertas la Esperantistojn, ke tiu vortaro povus nur semi konfuzon kaj malordon en la uzado kaj tiel grave malutili al la unueco de la lingvo;

Atentigas anticipe, ke la kritikaj konkludoj, kiujn kelkaj personoj eble faros pri Esperanto surbaze de tiu vortaro, estos senvaloraj, ĉar ili neniel koncernos la veran Esperantan lingvon.

Ir. J.R.G. Isbrucker, Prezidanto.

(Ĉi tiu oficiala informo venis kiam jam estis presita la artikoleto sur paĝo 4. Red.)

HEROLDO DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA
ORGANO DE LA ESPERANTO-
MOVADO

Prezoj:

Abono tutjara	\$4.00
Abono julio-decembro	2.00
Abono subtenanta	8.00
Anonceto po 25 vortoj.....	.50

Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.

la Praktiko

LA GAZETO DE LA MONDPOPOLO

Monata internacia ilustrita revuo

Prezoj:

Jarabono (nur por kalendara jaro) kun membreco en Universala Ligo:	\$2.00
Anonceto po 25 vortoj:	.50

Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.

KORESPONDADO (*Daŭrigo el paĝo 6*)

kie Panjo resendis ilin kunigitajn al mi kie ajn mi trovis min. (Se la leganto ne povas kompreni kiel mi trovis tiun metodon en botelo da malbona biero, li nur ne komprenas miajn pensometodojn . . . mia edzino ankaŭ deklaras ke ŝi ne povas . . . sed tamen jen la vico de elpensado: la biero aperigis mensobildon de ĉevalo; la ĉevalo, bildon de pomoj; pomoj, de vendejo; vendejo de mono, kiun mi laŭbezone pruntis de Panjo; Panjo—Panjo—jen la lumo! Certe klara kaj logika sekvo de bone ordigita menso, ĉu ne?

Nuntempe, la pli gravaj problemoj de internacia korespondado, al mi ŝajnas esti rilatataj pli al la enhavo de la leteroj ol al la sendado de la leteroj mem. Miaj gekorespondantoj almenaŭ unufoje po jaro demandas, "Kion vi scias pri la raporto ke inter Esperantistoj en Usono ekzistas malamikeco, ke kelkaj kulpigas la ceterajn pri dekstreco aŭ maldekstreco, kaj kiel nome de mil diabloj povas eniri la politiko en la aferojn de Esperantistoj tiom ke ili forgesas la vortojn de Zamenhof ĉe Bultonjo?"

Nu, post multe da pensado mi decidis nur skribi la veron; ke en iu lando—ankaŭ en Usono—povas okazi ke iuj Esperantoparolantaj personoj eble forgesas ke Esperanto mem estas neŭtrala ilo por paco, ne ilo per kiu neŭtraligi ĉiujn malsamideanojn. Esti Esperantisto ne estas garantio de racieco. Mi bedaŭrinde konas kelkajn gravulojn Esperantistajn usonajn, kiujn suferas neracia pasio por senpasia neracieco.

Pri la problemoj kiel teni la intereson de alilandaj korespondantoj, mi sugestas la uzadon de la sekvantaj "reguloj":

1. Skribu per maŝino, se eble.
2. Skribu interesajojn, ne stultaĵojn.
3. Lingve, estu freŝa. Legu, studu, relegu la bonajn novelojn kaj librojn de la pli

bonaj verkistoj.

4. Tenu kopiojn de viaj leteroj; vi bezonos ilin.

5. Se eble, trovu korespondanton kun samaj interesoj.

6. Neniam estu tro seriozema.

7. Ĉiam estu tre, tre tolerema.

Ne estante ekspertulo (ekspertulo: ia amatoro pli ol 10 kilometrojn for de sia hejmo), mi nur povas diri ke, sekvante la supredonitajn regulojn, mi ankoraŭ ĝuas daŭran korespondadon post 20 jaroj, kun multaj tre interesaj personoj en 14 landoj.

Kial ne sidiĝu nun—kaj skribu tiun leteron, kiun vi komencis skribi antaŭ 10—15 jaroj?

Boho.

Bonvolu Skribi

S-ro Takaŝi Tanaka, 41 Kamei, Jao-ŝi, Osaka-hu. 21-jara studento, elektroteknika fako Osaka Universitato. Ĉiuj temoj.

S-ro Hiroŝi Matukawa, 3-64 Nagai-tyo Sumiyosi-ku, Osaka. 20-jara studento. Kolektas BK-ojn, petas alilandajn antikvajn fabelojn.

Acuŝi Hoŝida, Titose-Daiiti-Hatudensyo, Sikotuko K.K. Hokkaido. 25-jara teknikisto. Pri tekniko, internaciaj kaj sociaj problemoj, interŝanĝi pm kaj pk.

S-ro Seinoske Kato, Ĉiriu-maĉi, Hekkai-gun, Aiĉi-ken. 42-jara oficisto de komunumo.

S-ro Masao Takasu, 372 Uzu, Wakayama-Si. 28-jara maŝinĝenero.

Hiroo Noboru, Kyotokoseien, Yamadahiraŝo-cho 17, Ukyo-ku, Kyoto. 28-jara inĝenero.

S-ro Maeda Sadatosi, 1430 Esaka Suita-si, Osaka. 21-jara laboristo.

(ĉiuj en Japanujo)



OR RIMISTOJ Kaj por ĉiuj, kiuj ŝatas infanojn. Eĉ poetoj legu ĉiĵoj!
Represita el *Bulteno Gepatra*. Dankon al Ges-roj R. Eichholz.



KUN SUĈINFANO

Viaj, viaj etaj
Ruĝaj, ruĝaj lipetoj.
Punkti-punkt sur nazo,
Tinti-tint orelo,
Taŭzi-taŭzi harojn.

Ofte rapide subentiru per via fingro la
malsupran infanan lipon, por ke la lipoj
fermu sin klakete. Tuŝetu la nazpinton,
tintigu la orelan lobon, kvazaŭ kombu la
harojn.

IO VENAS

Venas urso.
De kie ĝi venas?
Kien ĝi iras?
Al la kolo de . . . !
Venas muso, venas muso.
Serĉas . . . n, serĉas . . . n.
Kie li (ŝi) estas?
Tie li (ŝi) estas!

Parolu per malhela voĉo kiel "urso" aŭ
per hela voĉo kiel "muso" kaj irigu viajn
fingrojn de la infana piedo al ĝia kolo.
. . . uzu la nomon de la infano.

AĈETADO

Tie estas mono.
Iru al vendejo,
Kaj aĉetu pomon.
Sed ne perdu monon!

Dum ĉiu linio manfrapu la malfermitan
maneton.

GENURAJDANTOJ

Ŝipo, ŝipo naĝas,
naĝas sur la maro.
Venas forta vento —
renversiĝas ŝipeto.

. . . volas rajdi.
Nun la ĉevalo trotras,
nun la ĉevalo trotras,
nun ĝi galopadas,
nun ĝi galopadas,
ĝis . . . falas malsupren.

Tiel rajdas la sinjoroj,
tiel rajdas la sinjoroj,
tiel rajdas la knaboj,
tiel rajdas la knaboj,
kaj tiel nia . . . falas.

Ĉu vi povas rajdi?

O jes, O jes, O jes!
Ankaŭ sur ambaŭ flankoj?

O jes, O jes, O jes!
Ankaŭ troti kaj galopadi?

O jes, O jes, O jes!
Atentu, atentu, atentu! —
Nun vi falas teren!

Rajdigu la infanon sur la genuoj, sed
ne dum la demandoj.

Ge-anoj Eichholz, 133 Service Road,
Oakville, Ontario, Kanado, petas helpon
por kompili libron de rimoj, kantoj, ludoj,
ktp. por infanoj de Esperantistaj gepatroj.
RIMISTOJ HELPU!



Represo permesata se la fonto (*Bulteno Gepatra*) estas menciata.

CONTEST WINNERS (from page 11)

Esperanto, an international language developed over 50 years ago by Dr. Zamenhof, a Polish Jew.

Esperanto is not an artificial language, since it is based on root words common to the majority of languages. The grammar is simplified, with no exceptions to rules, the spelling phonetic.

Esperanto has many millions of adherents throughout the world and its purpose is not to replace national languages but rather to supplement them as a means of communication between people of different countries.

Public high schools in many countries are already participating in a course of ten lessons, after the fourth of which the students of the countries involved will begin corresponding with each other. A similar course may soon be started in the U.S.A. It seems to me that a good many people would like to avail themselves of this implement of modern culture.

The address of the secretary of the Esperanto League for North America is: Conrad Fisher, Rt. 1, Meadville, Pa. Membership in E.L.N.A. is open to all who want to help get the action of UNESCO implemented.

Mrs. Joey Przybilla

Bonvolu Skribi

Yukio Kuwahara, ĉe Yumeno-chugaku, Hyogo-ku, Kobe. Instruisto pri belarto en mezklasa lernejo, SAT-peranto. Pri ĉiuj temoj.

20 gelernantoj, 12—14-jaraj. Adresu al S-ro Kuwahara (supre). Kun gelernantoj en Usono kaj Kanado, pri ĉiuj temoj.

Oritu Ŝigeiĉi, Gjomeikan, 3-85, Takamico, Konohanaku, Osaka. Baptisto.

ANONCOJ

Tarifo: \$1 ĝis sep linioj. Dek procenta rabato por du- aŭ plifojaj aperoj. Petu informon pri tarifo por pli grandaj aŭ multfoje aperantaj anoncoj aŭ reklamoj.

Kristana Esperantista Ligo Internacia estas interdenominacia asocio de protestantaj esperantistoj. Ĝia gazeto Dia Regno aperas monate, eldonate en Nederlando. Ni invitas ĉiun esperantiston konsideri abonon al la gazeto, aŭ membrecon en la ligo. Petu informojn kaj provkzemplerojn de la usona peranto, Donald R. Broadribb, 310 So. 13th East, Salt Lake City 2, Utah. Kotizoj (abono: \$1.40, membreco: \$1.60) estas pageblaj al la peranto aŭ al la libro-servo.

● **ESPERANTOFONO** is the new 45 rpm unbreakable phonograph record which contains a detailed presentation of the phonetic system of Esperanto both by individual sound and by connected sentences of prose and poetry. Prose spoken by Prof. Dalmau, member of the Academy of Esperanto; poetry (*La Espero* and *La Vojo*) declaimed by Catalan poet Vila. Complete price only \$2.98 including postage and printed text of contents. Allow about 4 weeks for delivery. Order now from R. C. MARBLE, P. O. BOX 2081, VAN NUYS, CALIF. or direct from BELPOST, APARTADO 5164, BARCELONA, SPAIN.

LOGIKAĴO (el Eta Heroldeto)

Eĉ pankrusto pli satigas ol nenio. Sed nenio pli satigas ol plenplena festeno. Pli satiga, do, pankrusto ol plenplena festeno.

Esperanto: Ideala kunliganto.

Esperantisto: kunliganta idealisto.

PORTU LA VERDAN STELON

DECIDOJ de la ESTRARO

1. Pro manko da tempo, mono kaj kunlaboro ni (almenaŭ ĉi tiun jaron) *ne* venigu F-inon Major.
2. Ni ne nun faru ŝanĝon pri la komencdato de la membrecjaro.
3. Ni ne pristudu la aferon de la Monda Ligo.
4. La *Revuo* ne estu NUR propagandilo por neesperantistoj; ĝi nepre servu ankaŭ al la (jam) Esperantistoj kiel legindaĵo.
5. Ni ĉesos atakojn kontraŭ S-ro Connor en la *Revuo*.
6. Ni lasu la aranĝojn pri kovrilo al la redaktoro.
7. Ni akceptu reklamojn pagitajn por la *Revuo* je prezo de \$20.00 por tuta paĝo. Specialaj aranĝoj kostos pli (laŭ konsento kaj kalkulo de la redaktoro).
8. Ni akceptu S-ron Pollock kiel Estraranon ĝis la Kongreso.
9. Ni akceptu S-ron Helmuth kiel kom-

itatestron por organizado

10. Ni daŭrigu malkarajn liveradojn de la *Revuo*, sed se eble ni klopodu akiri donacojn por la Revua kaso.
11. La redaktoro-presisto mem scias plej bone kiom da mono oni bezonas por presado de la *Revuo*. Li havu la eblecon dissendi la Revuojn por propagandi nian aferon.
12. Ni esprimu nian koran dankon al S-ro Carlson pro la laboro farita.
13. Kiel komitatano por UEA: S-ro Armin F. Doneis.
14. Ni *ne plu* antaŭ la Kongreso dissendu membroliston. La Kongreso devas denove voĉdoni pri tiu delikata afero.
15. La nomoj de patronoj, dumvivaj membroj kaj subtenantoj estu presataj en la *Revuo*.
16. Membro de ELNA kiu estas paginta dum ses sinsekvaj jaroj la kotizon de patrono (\$10) do entute \$60 fariĝos *Dumviva Membro* (nur unufoje \$50.)

DUMVIVAJ MEMBROJ DE ELNA

Perry V. Eakin, Kansas City, Mo.
Thomas A. Goldman, Pacific Palisades, Cal.
Joseph Leahy, Watertown, N.Y.
Van Allen Lyman, Wallingford, Pa.
Edw. W. Pharo, Jr., Somerton, Pa.
David B. Richardson, Tacoma, Wash.
Lee Stern, Wallingford, Pa.

PATRONOJ

Lew W. Gobble, N. Hollywood, Cal.
John L. Lewine, New York City, N.Y.
Frank W. Vedder, Miami, Fla.

SUBTENANTOJ

Roland Barta, Denver, Colo.
Dirk M. Brink, San Diego, Cal.
F. R. Carlson, Seattle, Wash.
John E. Carpenter, Sacramento, Cal.
H. E. Dillinger, Placerville, Cal.
Armin F. Doneis, Pharr, Texas
Louis Dormont, Brooklyn, N.Y.

Eric Ekstrom, Inglewood, Cal.
A. J. Emery, Brooklyn, N.Y.
John E. Falk, Pasadena, Cal.
Dr. Howard French, Tübingen, Germany
John Futran, New York City, N.Y.
Frank L. Gaines, Indianapolis, Ind.
Homer R. Hansen, Bronx, N.Y.
B. L. Hanson, Raleigh, N.D.
Helen Hasselriis, Astoria, N.Y.
Robert Karlson, Boston, Mass.
Helen Larson, Seattle, Wash.
Victor F. Murray, Hoboken, N.J.
Ray Pease, Jersey City, N.J.
Dr. P. L. Pratley, Westmont, Quebec
Dr. Robert Rubinstein, Brooklyn, N.Y.
Mark Starr, New York City, N.Y.
Cecelia P. Thomas, Portland, Ore.
S-ino Wm. Topham, Jackson Heights, N.Y.
Jo Van Zwol, San Francisco, Cal.
Rev. E. B. Williams, Helena, Ark.
S. Miller Williams, Vicksburg, Miss.

Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in *hats*, *ĉ* as *ch* in *church*, *g* as in *go*, *ĝ* as *g* in *gem*, *ĥ* as *ch* in *loch*, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in *azure*, *s* as in *so*, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple, *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *si*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

-us; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those which the majority of languages have taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.


Learn
Esperanto
now!



It's
the language
of the future

ESPERANTO-BY-MAIL, 123 East 35th Street, Brooklyn 3, N. Y.

JUST PLAIN



THIS MAGAZINE IS THE OFFICIAL ORGAN
OF THE

Esperanto League
for North America, Inc.

If You Like The Review, You'll Like The League.

Why not Join Us Now?

Regular Member	\$ 3.00
Man and Wife	4.00
Supporting Member	5.00
Patron	10.00
Life Member	50.00

Membership includes subscription to the Review. All contributions to the League are tax-deductible. Review subscription alone, \$1.75.

Mail application and payment to:

Esperanto League for North America, Inc., Somerton 16, Pa.